

SCIENCA REVUO	El Vol 22
de Internacia	
Scienca Asocio	n-ro 2 (88)
Esperantista	5. 4. 1971.
(BEOGRAD, Jugoslavio)	

LA NOMOJ DE LA CETACOJ

(dua parto)

(W. de Smet, Kalmthout, Belgio)^(*)

5. Kelkaj kazoj de komplikaĵoj en la sciencaj nomoj

Por ilustri kiel la nomoj de la cetacoj renversiĝis dum la jardekoj, ni prenos kelkajn ekzemplojn. Similaj kazoj troviĝas cetere tra la tuta animalaro.

I. En 1804. la angla sciencisto SOWERBY trovis ĉe la angla marbordo la kadavron de stranga cetaco, kiu havas nur du dentojn, ambaŭ en la malsupra makzelo. Li priskribis ĝin kaj nomis ĝin **Physeter bidens**, opiniante ke ĝi estas reprezentanto de la genro **Physeter**, al kiu apartenas la kaĉaloto. Sed en 1817. BLAINVILLE opiniis ke tiu animalo estas delfeno kaj nomis ĝin **Delphinus Sowerbensis**, tiel jam enkondukante eraron en la

nomo de SOWERBY. Aliaj imitis tiun kutimon, uzante kiel specian nomon: **Sowerbensis**, **Sowerbyi**, **Sowerbaei**, **sowerbi**, **sowerbiensis**, **sowerbyensis**, kaj lokigante la onimalon en aliajn genrojn; **Diodon**, **Anodon**, **Heterodon**, **Ziphius**, **Micropteron**, **Nodus** k. t. p. Aliaj opiniis ke la animalo ne estas konigita de SOWERBY, sed ke jam en 1732. la anglo DALE rakontis pri ĝi; tial ili proponis la specian nomon **Dalei**. Ne devas miri ke HERSHKOVITZ povas citi 23 diversajn sciencajn nomojn por tiu cetaco!

La nomaro de tiu specio eĉ estas per pli granda ol tiu dudektrio, se oni enkalkulas ĉiujn variaĵojn per aldono de la aŭtora nomo. Tio povas esti ilustrata per la sekvanta vico, kiu koncernas la nomojn per kiuj oni citis unu ekzempleron de tiu specio, kiu surstrandiĝis en Oostende (Belgio) en 1835. (vidu detalojn pri tio en la

(*) d-ro en zoologio, Wilgendreef 14, Heide, KALMTHOUT, Belgio

studajo de DE SMET pri la cetacoj de la flandra marbordo):

Delphinorhynchus micropterus CUV.
 Delphinorhynchus micropterus
 Delphinus micropterus
 Heterodon bidens
 Hyperoodon micropterus CUV.
 Hyperoodon micropterus
 Mesoplodon bidens SOWERBY
 Mesoplodon Sowerbensis
 Mesoplodon sowerbensis
 Mesoplodon Sowerbiensis
 Micropteron Sowerbiensis
 Micropteron Sowerbyi DESM. ESCHR.
 Micropteron Sowerbyi
 Ziphius Sowerbiensis BLAINV.
 Ziphius Sowerbiensis.

Cu oni povus imagi ke ĉiam temas pri la sama animalo, se oni ne absolute scius ke estus jes?

Laŭ la nunaj reguloj de la nomenklaturado la unue uzita nomo **Physeter bidens**) devus havi la priorrecon super ĉiuj aliaj. Sed tiu specio ne apartenas al la genro **Physeter**, eĉ al tute alia familio. Do necesas alia genra nomo. La genra nomo tamen ankaŭ elvokas multajn problemojn. La unua sciencisto kiu rezervis specialan genron por tiu specio, estis LESSON, kiu kreis en 1828. la genron **Aodon**; sed poste evidentigis ke tiu termino jam estis kreita en 1798. de LACEPEDE por genro de fiŝoj. Tiu nomo do ne estas aplikebla (art. 53). Tion cetere jam rimarkis en 1830. WAGLER, kiu proponis la genran nomon **Nodus**. Sed tiu genra nomo ne estis uzata de la samtempuloj kaj ĝi do restis nekonata kaj poste forgesita. Jen trafa kazo de tio kion oni nomas »nomen oblitum« (forgesita nomo): inter 1850.

kaj 1961. neniuj uzis ĝin, nek rimarkis ĝian ekziston. Kaj laŭ art. 23 b de la kodo de Zoologia Nomenklaturado iu forgesita nomo ne povas esti reuzigata. En 1846. WAGNER uzis la nomon **Micropteron**; ankaŭ tiu nomo estas forĵetinda ĉar en 1802. simila nomo jam estis enkondukita de LACEPEDE por nomi genron de fiŝoj. En 1849. ESCHRICHT uzis preskaŭ similan nomon: **Micropteron**; sed ankaŭ tiu nomo kvazaŭ ne estis uzata, kaj ĝi do fariĝis »nomen oblitum«. En 1850. GERVAIS uzis la nomojn **Dio-plodon** kaj **Mesoplodon** por specioj de tiu genro. Kvankam la nomo **Dio-plodon** havas priorrecon de kelkaj linioj (ĝi estas citata antaŭ **Mesoplodon**) ĝi tamen devas esti malpreferata pro artikolo 24 a I de la kodo; tiu ĉi artikolo citas ke en tiaj kazoj la nomo, kiu estas preferata dum la unua revizio de tiu animalgrupo, devas esti valida. Do **Mesoplodon** devus esti la preferenda nomo. Fakte ĝi estas la sesa en la vico, kaj verdire la vico ne estas kompleta ĉar 8 aliaj nomoj estis proponitaj poste!

Do, laŭ la nuna nomenklaturado tiu animalo devus nomiĝi **Mesoplodon bidens** (SOWERBY). Tiu nomo estas tute konforma al la reguloj de la kodo. Sed ĉu ĝi povas plaĉi al ni? Por traduko ĝi ne taŭgas, ĉar ĝi estas vera taŭtonomio. La unua vorto estas greka, konsistanta el »meso-« (meza), »plo-« (obla) kaj »odon« (dento), do: »obla dento en la mezo (de la muzelo)«. Kaj la dua vorto estas latina, konsistanta el »bi-« (duopa) »dens« (dento), do: »duopdenta«. Se oni konas la animalon, oni ne povas esti

kontenta pri tiu nomo. Fakte la nomo estas nevera: nur la virseksaj plenkreskintaj ekzempleroj havas tiujn du dentojn, la inseksaj kaj la junaj ne. Krome tiu karakterizaĵo ne estas propra al tiu ĉi specio: ĉiuj specioj de la genro **Mesoplodon** (kaj ili estas 10 laŭ HERSHKOVITZ, sed 12 laŭ MOORE) montras tiujn du dentojn, almenaŭ la virseksuloj. Laŭ signifo la nomo do ne estas korekta kaj ne ekskluziva. Sed ĝi estas plene konforma al la reguloj de la zoologia nomenklatur.

2. Alia specio de la genro **Mesoplodon** ankaŭ meritas nian atenton pro sia vere nekonvena nomo kaj pro la interesaj disputoj. En sia verko »Zoologie et Paléontologie française« aperinta inter 1848. kaj 1852., GERVAIS citis alian dudontan cetacon, kiun li nomis **Dioplodon europaeus**. La animalo estis trovita en la Atlantika Oceano ĉe la enfluejo de la Franc-brita Markolo. Sed GERVAIS tiam ne priskribis animalon; sekve temas ĉi tie pri tiel nomita »nomen nudum« nuda nomo). Nur en 1855. aperis la priskibo, akompanata de la sama nomo.

En 1866. DESLONGCHAMPS nomis tiun animalon **Dioplodon gervaisi**, kaj denove priskribis ĝin. Tiu nomo estas poste ĝenerale aplikata, speciale ĉar oni opiniis ke la de GERVAIS uzita nomo ne estas aplikebla, estante »nomen nudum« (art. 12)

Laŭ la reguloj la akceptenda nomo devus esti **Mesoplodon europaeus** (GERVAIS), ĉar:

1. la animalo apartenas al la genro kiu devas esti nomata **Mesoplodon** (vidu supre)

2. la nomo **Dioplodon europaeus** ne estas »nomen nudum«, ĉar GERVAIS uzis ĝin en 1855., priskribante samtempe la animalon, kaj ĝi do havas priorecon super aliaj nomoj (art. 12)

3. la skribmaniero »europaeus« devas esti anstataŭata per »europaeus« (ĝenerala rekomendo no 3)

4. la aŭtonomo de GERVAIS devas troviĝi inter krampoj ĉar la genra nomo ne estas la sama kun tiu kiun la aŭtoro uzis (art. 51 d)

Sed aliflanke nomo kiel **Mesoplodon europaeus** (GERVAIS) estas senŝenca: tiu specio ne estas eŭropa! Nur hazarde unu ekzemplero estis forvagitinta ĝis en eŭropajn marojn. La vera vivteritorio de tiu specio estas la Karaiba maro!

Jen do vera nekonsekvencaĵo de la nomenklatur, tutsimple pro la regulo de la prioreco!

3. Eĉ nomoj kun malmultaj sinonimoj povas montri siajn strangaĵojn. Ofte ili estas tiaj ke oni povas apenaŭ konsideri ilin simplaj aŭ logikaj. Ni prenu la ekzemplon de **Cephalorhynchus heavisidei** (GRAY), nomo konsistanta el 10 silaboj kaj 25 literoj. La genra nomo estas grekdevena, la specia nomo angladevena. GRAY konigis tiun specion en 1828. sub la nomo **Delphinus Heavisidii**. En 1846. la sama GRAY enkondukis la nomon **Cephalorhynchus** por pluraj specioj de delfenoj, i. a. la citata specio. Tiu nomo konsistas el du grekaj vortoj: »cephalê« (kapo) kaj »rhynchos« (muzelo) kaj signifas do »muzelkapulo«.

Sed kio pri tiu specia nomo? Ĝi estas genitivo de propra nomo kaj ĝi tuj pensigas pri HEAVISIDE, sciencisto kiu multe kontribuis al la zoologio. Sed tiu ĉi persono ne havas iun rilaton kun tiu ĉi delfeno. La rilato

tamen ekzistas kun ŝipkapitano HAVISIDE, kiu alportis la skeleton de la unua animalo el Sudaŝafrikaj maroj. GRAY tamen eraris skribante la nomon (kaj eĉ poste neniam konstatis sian eraron), tiel ke nun la merito pri la konigo de tiu delfeno iras al alia persono ol al tiu al kiu ĝi devus esti direktata.

4. Kiel priskribite supre, la foceno estas nomata de LINNAEUS en 1758.: »Delphinus Phocoena«. LINNAEUS vere uzis la signon de kombinita a kaj e; tio eble estas erara skribo (aŭ preseraro?) anstataŭ kombinita a kaj e ĉar la greka nomo estas »phokaina«. Cetere en 1756. LINNAEUS skribis »Phocaena«. Poste en francaj libroj oni distingis la genron »Phocoena« por tiu specio kaj oni ankaŭ uzis en ĉi tiu vorto kombinson de o kaj e. Sed jam en tiu sama periodo la distingo inter ae kaj ce ne estis klara en la skribaĵoj, tiel ke aperis en la pasinta jarcento tuta variaĵaro de nomoj (tiel por la genro kiel por la specio kun aŭ sen majusklo): **Phocoena**, **Phocaena**, **Phocoena**, **Phocaena**, **Phocena**, kaj eĉ misskriboj kiel **Phaecaena**.

Aliaj specioj, kiuj similis al la foceno, akiris nomojn kiuj estis derivaĵoj de unu el ili: tiel estiĝis nomoj kiel **Neophocaena**, **phocoenoides**, **phocaenoides**, k. t. p.

Kiel do estas la vera skribmaniero de la nomo? HUSSON skribis studon speciale pri tiu problemo. Laŭ li, same kiel laŭ li, same kiel laŭ HERSHKOVITZ, la nomo devas esti **Phocoena phocoena** (LINNAEUS), kvankam restas dubo pri la unua uzo de la genra nomo **Phocoena**: ĉu estis Georges CUVIER kiu unue uzis ĝin en 1816 aŭ en 1817., aŭ ĉu antaŭe jam alia aŭtoro uzis ĝin, sed en la formo **Phocaena**? Se tio lasta montriĝus esti vera, oni devus skribi **Phocaena phocoena**

(LINNAEUS). Tio estus nelogika, sed tio estus laŭ la reguloj de la nomenklaturado (art. 56 a)

La kazo de la aliaj specioj estas same komika, ĉar ekzistas: **Phocoenoides dalli** (TRUE) kaj **Neophocaena phocaenoides** (G. CUVIER), tutsimple pro la unuaj ortografioj de tiuj nomoj. Ĉu povas ekzisti pli stulte?

Tiuj ĉi kvar ekzemploj estas nur ĉerpajoj el la granda aro, kiun oni povus pridiskuti. Ili tamen sufiĉas por klarigi ke la nomenklaturado de la scienco ne estas logikaĵo aŭ perfektaĵo, kaj ke ĝia celo, unueco, estas iom vana.

6. Nomoj de cetacoj en Esperanto.

De kiam estiĝis Esperanto, aperis kelkaj nomoj de cetacoj en tiu lingvo. Plejparte ili estis ĉerpitaj el la latina lingvo kaj adaptitaj al Esperanto. Laŭ la bezonoj novaj nomoj estas formitaj. Iom granda nombro el ili troviĝas en la »Bildlibro pri bestoj« (eldonaĵo de »Daily Mail«): Gronlanda(*) baleno, ĝib-dorsa baleno, blua baleno, kaĉaloto, orko, narvalo, pilota aŭ nigra foceno, vulgara foceno, vulgara delfeno narvalo. El ili nur la nomoj kaĉaloto kaj narvalo ne havas latinan devenon, sed ili respondas al internacieco. Ĉar tiu libro estas traduko el la angla lingvo, tiu lingvo nepre influis la nomfaradon: »vulgara delfeno« evidente estas traduko de »common delphin«. Sed tia nomo ne estas adekvata, ĉar animalo kiu povas esti »vulgara« specio en iu regiono, povas esti tre malofta en alia. En libro destinata al la tuta mondo tia termino ne estas ap-laŭdinda.

(*) La libro uzas Gronlanda, kvankam Groenlanda estus preferinda.

Cu necesas krei pli da nomoj en Esperanto? Tio dependos de la bezonoj. Nur se oni parolas aŭ skribas pri iu animalo por ĝenerala publiko, ĝia nomo estos necesa. Por scienca publiko povas sufiĉi la scienca nomo. Sed ĉar en la nuntempo la kono de la latina kaj greka lingvoj ne plu estas ĝenerala, eĉ inter sciencistoj, oni povas konjekti ke iu speciala scienca nomo en Esperanto, nepre havas avantaĝojn. Tiu ideo jam ĝermas en la kapo de pluraj kaj ĝi klare esprimiĝis dum la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva Problemo en la Sciencoj, okazinta en Kopenhago en aŭgusto 1962.

Ekzistas propono ke oni transskribu la sciencajn latindevenajn nomojn en Esperanton. Sed ĉu tia propono estas plene racia? Kio ekzemple pri la cetacoj? Ilia nomenklaturado apenaŭ estas en ordo, kaj la sinonimoj abundas. Ĉu oni transskribus ĉiun sinonimon en Esperanton? Kaj kion fari se iu opinias ke nova genro devas esti enkondukita por kelkaj specioj aŭ ke iu specio devas transiri al alia genro? Ĉu oni sekvas tiun opinion? Kaj ĉu oni ne tro ŝarĝos la Esperanto-vorttrezon per abundo de novaj terminoj neuzotaj? Kaj ĉu oni sklave sekvas ĉiujn nelogikaĵojn de la nuna scienca nomenklaturado?

Oni nur prenu kiel problemon kelkajn el la supre cititaj ekzemploj. Ĉu nur unu specio el la genro **Mesoplodon**, nome **Mesoplodon bidens** (SOWERBY), estos nomata Mesoplodono aŭ Mezopledonto dudenta, se tiu dudentenco estas propra al ĉiuj plenkreskaj virseksuloj de tiu genro, kaj

nur al ili? Ĉu oni ankaŭ parolos pri Mesoplodono eŭropa, kvankam tiu specio ne estas eŭropa sed karaiba? Ĉu ankaŭ ekzistos iu Cefalorinĥo heaviside'a anstataŭ Cefalorinĥo heaviside'a?

La respondoj pri tiuj demandoj certe ne kontentigos ĉiujn.

Alia ebleco estas flankelasi la tutan ekzistantan sistemon kaj konstrui iun tute novan, bazitan je aliaj principoj. Tia nova sistemo ne estas aposteriora kiel la nuna zoologia nomenklaturado estas (ĉar tiu ĉi baziĝas sur la nunaj nomoj), sed apriora: ĝi indikas kiel la nomoj devas esti kreataj. En tia sistemo la genraj nomoj ne devus ekzisti, la nomoj devus kiel eble esti logikaj kaj ekskluzivaj, sinonimoj ne povus ekzisti, la nomdonado devus okazi laŭ antaŭe difinitaj reguloj kaj devus esti kontrolata kaj aprokata de tiu celaj komisionoj.

Tia nomsistemo estas io kio povus evoluigi sur tute novaj bazoj, unue paralele kun la nun funkcia, poste iom anstataŭante ĝin. Ĝi estas aplikebla tiel al zoologio kiel al botaniko. Por ĝia nomo oni povas proponi: Nova Biologia Nomenklaturado aŭ simila termino en alia lingvo (mallongigita: NBN). Ekzemplo de ĝi, tamen malgranda, jam aperis en 1959. (verkita en 1958. du jarcentojn post la apero de la deka eldono de la »Systema naturae«); ĝi estis aplikata al la malgranda ordo de la polipteroj, primitivaj fiŝoj.

Bedaŭrinde tia sistemo nur estas aplikebla al ordoj aŭ familioj kies konsiston oni pli malpli konas. Pri la cetacoj tio feliĉe estas iom la kazo, danke al la verko de HERSHKOVITZ.

Tial, por provi la taŭgecon de la sistemo, provo estas farita ϕ krei la cetacajn nomojn en Esperanto. La leganto juĝu pri la valoro de tiu provo. Li ne forgesu ke la cetacoj estas tre malfacila ordo kaj ke pri multaj specioj ne ekzistas taŭgaj priskriboj nek ekskluzivaj karakterizaĵoj. Krome oni ne forgesu ke la listo de HERSHKOVITZ nur indikas la nomojn de la specioj, sed ne iliajn aspektojn aŭ karakterizaĵojn.

En aldonaĵo al tiu artikolo aperas la reguloj de la Nova Biologia Nomenklaturato, kiel ilin proponas la elpensinto. El tiuj reguloj evidentiĝas kiel estiĝas la NBN-nomoj. La leganto

krome povos konstati ke la NBN-sistemo estas tute alia ol la klasika sistemo; ĝi estas komplete apriora anstataŭ aposteriora, eĉ por la tipoj de ordo, familio, speci-grupo kaj specio. Ĝi signifas vere kompletan renversion de la metodoj de la sistematiko. Ĝi povus esti promesplena projekto por la biologio de la 21a jarcento, kiu jam nun estas nomata la »Jarcento de la Biologio«.

En tiu konteksto la NBN-nomoj de la cetacoj, same kiel pli malgranda skalo la nomoj de la polipteroj, estos modelo de tio kion la biologio vere bezonas.

BIBLIOGRAFIO.

- (Anonime): International Code of zoological nomenclature adopted by the XV International Congress of Zoology. London 1964.
- BRINKMANN A. jr., 1967. The identification and names of our Fin whale species. Norsk Hvalfangst-Tidende, 56, pp. 49—56.
- DE SMET, W. M. A., 1959: La polipteroj, strangaj afrikaj fiŝoj. Scienca Revuo, 11, pp. 19—27.
- , 1963: Konsideroj pri la Biologia Nomenklaturato. Scienca Revuo, 13, pp. 117—119.
- , 1967: Nunaj mondperceptoj per la biologio. En: La mondpercepto de la modernaj natursciencoj, pp. 63—73. Nurnberg: L. Pickel.
- , 1969: Inventaris van de walvisachtigen (cetacea) van de Vlaamse kust en de Schelde (aperonta)
- HERSHKOVITZ, Philip, 1961: On the nomenclature of certain whales. Fieldiana — Zoology, 39, (no 49) pp. 547—565.
- , 1966: Catalog of living whales. United States nat. Museum Bull., 246, 259 pp.
- HUSSON, A. M. 1968: Over de schrijfwijze van de wetenschappelijke namen van de muskusrat, *Ondathra zibethicus* (L.), en van de bruinvis, *Phocoena phocoena* (L.). Lutra, 10, pp. 17—23.
- KELLOGG, R., 1940: Whales giants of the sea. Nat. geogr. Mag. 77, pp. 35—90.
- LINNAEUS, C., 1756: Systema naturae. Editio IX. Lugduni Batavorum.
- , 1758: Systema naturae. Editio X. Stockholmi.
- MOORE, J. C., 1968: Relationships among the living genera of beaked whales with classifications, diagnoses and keys. Fieldiana — Zoology, 53, (n 4), pp. IV 209—298.
- NEERGAARD, P., 1963: La lingva problemo en la biologiaj kaj agronomiaj sciencoj. Scienca Revuo, pp. 103—110.
- STØP-BOWITZ, C., 1963: Kiel nomi la organismojn? Scienca Revuo, 13, pp. 110—117.
- TOMILIN, A. G., 1966: Cetacea. Israel Programm of Scientific Translations (originale en la rusa, 1957).
- TRUE, F. W., 1889: Contributions to the natural history of the cetaceans, a review of the family Delphindae. United States nat. Mus. Bull., 36, 191 pp. + XLVII pl.
- WALKER, E. P., 1964. Mammals of the world, vol. II. Baltimore: John Hopkins Press.
- (Pluraj aŭtoroj), 1961. Bild. libro pri bestoj. London: Assoc. Newsp.

TABELO I.

Listo de la specioj de cetacoj. (°)

Nuna zoologia nomenkaturō	Propono por	
ORDO: CETACEA	Nova Biologia Nomenklaturō Genro (°)	
SUBORDO: ODONTOCETI	ORDO: DELFENOZULOJ	
	SUBORDO: DENTARDEL	
	FENOZULOJ	
Familia: Susuidae	Familio: Rostrodelfenoj	
Pontoporia blainvillei (GERVAIS & D'ORBIGNY, 1844)	Rostrodelfeno brungriza	A-1
Inia geoffrensis (BLAINVILLE, 1817)	Rostrodelfeno familitipa	A-2
Lipotes vexillifer MILLER, 1918	Rostrodelfeno grizblanka	A-3
Susu gangetica (LEBECK, 1801)	Rostrodelfeno plumbnigra	A-4
Familia: Delphinidae	Familio: Delfenoj	
Steno bredanensis (LESSON, 1828)	Delfeno malglatdenta	B-1
Sotalia fluviatilis (GERVAIS & DEVILLE, 1853)	Delfeno tukukse	B-2
Sotalia guianensis (P. J. VAN BENEDEN, 1864)	Delfeno gvajana	
Sotalia brasiliensis E. VAN BENEDEN, 1875	Delfeno oranjeplanka	
Sotalia chinensis (OSBECK, 1765)	Delfeno violetflipera	
Sotalia borneensis LYDEKKER, 1901	Delfeno grizmakulara	
Sotalia lentiginosa (GRAY, 1866)	Delfeno brunmakulara	
Sotalia plumbea (G. CUVIER, 1829)	Delfeno plumbkolora	
Sotalia teuszi KUKENTHAL, 1892	Delfeno teuse	
Stenella asthenops (COPE, 1865)	Delfeno astenopse	B-3
Stenella clymene (GRAY, 1850)	Delfeno klimene	
Stenella coeruleoalba (MEYEN, 1833)	Delfeno flankstria	
Stenella crotaphiscus (COPE, 1865)	Delfeno krotafiske	
Stenella dubia (G. CUVIER, 1812)	Delfeno cindrokolora	
Stenella frontalis (G. CUVIER, 1829)	Delfeno frenate	
Stenella graffmani (LONNBERG, 1934)	Delfeno makularvosta	
Stenella longirostris (GRAY, 1828)	Delfeno alope	
Stenella pernettyi (DESMAREST, 1822)	Delfeno multmakulara	

(°) La specioj listigitaj kaj iliaj sciencaj nomoj estas citataj laŭ la vico de P. HERSHKOVITZ: »Catalog of living whales«, krom kelkaj malgrandaj modifoj.

(°) Tiu ĉi indiko de la genroj estas propra al la Nova Biologia Nomenklaturō.

Delphinus delphis delphis LINNAEUS, 1758	Delfeno diverskolora tipregiona	B-4
Delphinus delphis ponticus BARABASH-NIKIFOROV, 1935	Delfeno diverskolora nigromara	
Delphinus dephis bairdi DALL, 1873	Delfeno diverskolora pacifika	
Tursiops truncatus aduncus (EHRENBERG, 1832)	Delfeno ordotipa multoceana	B-5
Tursiops truncatus truncatus (MONTAGU, 1821)	Delfeno ordotipa tipregiona	
Tursiops gilli DALL, 1873	Delfeno kvazaŭ-ordotipa	
Lissodelphis peroni (LACEPEDE, 1804)	Delfeno gracibela	B-6
Lissodelphis borealis (PEALE, 1848)	Delfeno kvazaŭ-gracibela	
Lagenodelphis hosei FRASER, 1956	Delfeno lagenodelfe	B-7
Lagenorhynchus acutus (GRAY, 1828)	Delfeno bankflanka	B-8
Lagenorhynchus albirostris GRAY, 1846	Delfeno blankmuzeleta	
Lagenorhynchus cruciger (QUOY & GAIMARD, 1824)	Delfeno krucigere	
Lagenorhynchus electra GRAY, 1846	Delfeno ovalkapa	
Lagenorhynchus obliquidens GILL, 1865	Delfeno ogneve	
Lagenorhynchus thicolea GRAY, 1846	Delfeno tikole	
Cephalorhynchus commersoni (LACEPEDE, 1804)	Delfeno arlekenkolora	B-9
Cephalorhynchus eutropia (GRAY, 1846)	Delfeno panope	
Cephalorhynchus hectori (P.J. VAN BENEDEN)	Delfeno hektore	
Cephalorhynchus heavisidei (GRAY, 1828)	Delfeno strangkolora	
Orcaella brevirostris (GRAY, 1866)	Delfeno sferkapa	B-10
Pseudorca crassidens (OWEN, 1846)	Delfeno ŝtupmuzela	B-11
Orcinus orca (LINNAEUS, 1758)	Delfeno terurdenta	B-12
Grampus griseus (D. CUVIER, 1812)	Delfeno malmultedenta	B-13
Globicephala melaena melaena (TRAILL, 1809)	Delfeno longflipera tipregiona	B-14
Globicephala melaena sieboldi GRAY, 1846	Delfeno longflipera nordpacifika	
Feresa attenuata GRAY, 1875	Delfeno fereso	B-15
Phocoena spinipinnis (BURMEISTER, 1865)	Delfeno strangfluka	B-16
Phocoena sinus NORRIS & MACFARLAND, 1958	Delfeno sunise	

Phocoena dioptrica (LAHILLE, 1912)	Delfeno komikokula	
Phocoena phocoena (LINNAEUS, 1758)		
Phocoenoides dalli (TRUE, 1885)	Delfeno focenonoma Delfeno karnozegingiva	B-17
Neophocaena phocaenoides (G. CUVIER, 1829)	Delfeno tuberdorsa	B-18

Familia : Monodontidae**Familio : Koldelfenoj**

Delphinapterus leucas (PALLAS, 1776)	Koldelfeno familitipa	C-1
Monodon monoceros LINNAEUS, 1758	Koldelfeno narvalonoma	C-2

Familia : Physteridae**Familio : Kaĉalot-delfenoj**

Kogia breviceps (BLAINVILLE, 1838)	Kaĉalot-delfeno rondozkapa	D-1
Physetor catodon LINNAEUS, 1758	Kaĉalot-delfeno familitipa	D-2

Familia : Hyperoodontidae**Familio : Zifio-delfenoj**

Tasmacetus shepherdi OLIVER, 1937	Zifio-delfeno dentriĉa	E-1
Berardius arnuxi DUVERNOY, 1851	Zifio-delfeno kvazaŭ-plejgranda	E-2
Berardius bairdi STEJNEGER, 1883	Zifio-delfeno plejgranda	
Mesoplodon bidens (SOWERBY, 1804)	Zifio-delfeno klindenta	E-3
Mesoplodon europaeus (GERVAIS, 1855)		
	Zifio-delfeno ĝervese	
Mesoplodon mirus TRUE, 1913	Zifio-delfeno makularventra	
Mesoplodon grayi VON HAAST, 1876	Zifio-delfeno olodone	
Mesoplodon ginkgodens NISHIWAKI & KAMIYA, 1958		
	Zifio-delfeno ginkofolidenta	
Mesoplodon layardi (GRAY, 1865)	Zifio-delfeno vire-ponardodenta	
Mesoplodon densirostris (BLAINVILLE, 1817)		
	Zifio-delfeno vire-kolosdenta	
Mesoplodon stejnegeri TRUE, 1885	Zifio-delfeno stenegere	
Mesoplodon bowdoini ANDREWS, 1908		
	Zifio-delfeno bodone	
Mesoplodon carlhubbsi MOORE, 1963	Zifio-delfeno karlhubse	
Ziphius cavirostris G. CUVIER, 1823	Zifio-delfeno familitipa	E-4
Hyperoodon planifrons FLOWER, 1882	Zifio-delfeno kurbetfrunta	E-5
Hyperoodon ampullatus (FORSTER, 1770)		
	Zifio-delfeno ĝibofrunta	

SUBORDO : MYSTICETI

SUBORDO : BARTARDELFENOJ

Familia : Eschrichtiidae**Familio : Sulketbalenoj**

Eschrichtius gibbosus (ERXLEBEN, 1777)

F-1

Sulketbaleno familitipa

Familia : Balaenopteridae**Familio : Sulkarbalenoj**

Balaenoptera acutorostrata LACÉPÈDE, 1804

G-1

Sulkarbaleno flavbarta

Balaenoptera edeni ANDERSON, 1878

Sulkarbaleno mallongbarta

Balaenoptera borealis LESSON, 1828

Sulkarbaleno buntbarta

Balaenoptera physalus (LINNAEUS, 1758)

Sulkarbaleno subordotipa

Balaenoptera musculus (LINNAEUS, 1758)

Sulkarbaleno giganta

Megaptera novaeangliae (BOROWSKI, 1781)

G-2

Sulkarbaleno bosplena

Familia : Balaenidae**Familio : Faŭkbalenoj**

Caperea marginata (GRAY, 1846)

Faŭkbaleno miniatura

H-1

Eubalaena glacialis australis (DESMOULINS, 1822)

H-2

Faŭkbaleno familitipa sudhemisfera

Eubalaena glacialis glacialis (MÜLLER, 1776)

Faŭkbaleno familitipa tipregiona

Eubalaena glacialis japonica (LACÉPÈDE, 1804)

Faŭkbaleno familitipa pacifika

Balaena mysticetus LINNAEUS, 1758

Faŭkbaleno enormkapa

H-3

(Daŭrigo kaj fino en la n-ro 3)